

### Enskribo

pri la jarkunveno okazinta la 7an de februaro 1961 je la 20a horo en la klubejo en la domo de Parko de Kulturo kaj Ripozo, Brno, Rooseveltova 13. Ĉeestis ĉ. 26 klubanoj; por Parko de Kulturo kaj Ripozo (PKR) ĉeestis k-ino Vilma Enžlová. Post malfermo de la kunveno fare de la prezidanto s. Vondroušek kaj bonvenigo de la ĉeestantoj kaj k-ino Enžlová li invitis la sekretarion s-anon Kořínek tralegi la sekretarian jarraporton. Poste donis la kasisto s-ano Borkovec supervidon pri la mastrumado per niaj monrimedoj kaj ambaŭ raportoj same kiel konciza raporto de la bibliotekisto s-ano Ballay estis aprobitaj kaj la ĝisnuna estraro de la klubo ricevis absolutorion. Por la novelekto de la nova estraro de la Rondeto transprenis prezidon s-ano Baláš kaj prezentis la preparitan kandidatliston. Ĝi estis ĉiesvoĉe akceptita kun kompletigo laŭ propono el la ĉeestantoj akcepti s-aninon Z. Vaverková. Estis elektita jena estraro: Marie Adamcová, Aleš Berka, Tomáš Borkovec, Jos. Friedrich, Jiří Kořínek, Marta Lorková, Věra Podhradská, Dagmar Konecká, Dr. inĝ. Jaromír Šikula, prof. Vilibald Scheiber, Jos. Ambrož, Zorka Vaverková, Josef Vondroušek. Kiel revizoroj estis elektitaj s-anoj Milosl. Němec kaj Sáva Střelec, bibliotekisto s-ano Jos. Ballay. S-ano Vondroušek reprenas la prezidon dankante al ĉiuj estintaj komitatanoj. Kaj petate subtenon de PKR por nia afero ĉe la foiro de Brno. Post liberaj proponoj estis kunvokita la unua komitata kunveno, kiun ĉeestis ges-anoj Jos. Vondroušek, Jos. Friedrich, Jiří Kořínek, Marie Adamcová, Tomáš Borkovec, Aleš Bednařík, Marta Lorková, Dagmar Konecká, Zorka Vaverková, bibliotekisto Jos. Ballay kaj por PKR k-ino Vilma Enžlová. La funkcioj estis jene asignitaj: Jos. Vondroušek – prezidanto, Jos. Friedrich – vicprezidanto, Jiří Kořínek – 1a sekretario, Marie Adamcová – 2a sekretario, Tom. Borkovec – kasisto, Marta Lorková, gvidantino de junularo. Komitatanoj Jos. Ambrož, Aleš Bednařík, Věra Podhradská, Dr. inĝ. Jaromír Šikula, Prof. Vil. Scheiber, Dagmar Konecká, Zorka Vaverková. K-ino Enžlová proponas, ke nia komitato kunvenu kun ŝi ĉiumonate unufoje je la 19.30 h en nia klubejo por pritrakti la farendaĵojn. Ŝi proponas distribui la laborojn inter ĉiujn komitatanojn kaj aliajn aktivulojn. K-ino Enžlová klarigas la perspektivojn de nia plua laboro kaj proponas al ni helpon.

Finite je la 21.45 horo.

Enskribis 8.2.1961 Jiří Kořínek

### Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 5an de septembro 1961 en la klubejo en la domo de Parko de Kulturo kaj Ripozo. Ĉeestis s-anoj: Vondroušek, Friedrich, Adamcová, Borkovec, Lorková, prof. Scheiber, Kořínek. S-ano Kořínek post malfermo de la kunsido antaŭ la kunveno je la 20a horo raportas pri la okazigo de Esp-kursoj pri la lernolibroj. S-ano Kořínek anoncas la alvenon de somera vizito el Rostov ĉe Don la 13an kaj 14-an de sept. Oni komisiis s-anon Kořínek informiĝi, kie tranoktos la soveta karavano de medicinistoj el Rostov, inter kiuj alvenos ankaŭ s-ano docento Viktor Gruško. Kaj prizorgi magnetofonon. Oni priparolis kun prof. Scheiber la aranĝon de la 60-datrevena soleno en novembro. Kaj pri la programoj de la teatra vespero. Ni petos ankaŭ ĉe l'Parko de Kulturo interŝanĝon de la difektaj lumtuboj en nia klubejo. Estis raportite, ke la bultenoj estos post 2 tagoj pretaj kaj ni dissendos ilin ree brigade.

Finite je la 20.45 h.

Jiří Kořínek